

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 20-an de aŭgusto 2020 per Skype

(aprobata en la interkonsiliĝo la 24-an de septembro 2020)

Ĉeestis:

Mario Machlik, Amelie Matt kaj Claude Rouget (Tromsø)

Herman Ranes kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Lars Sandbakk (Stavanger)

Bård Hekland (Bergen)

0. Tagordo

La tagordo estis aprobata kaj kelkaj punktoj aldonitaj por Eventualaĵoj.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 28-an de majo

La protokolo estis dissendita retroŝte la 13-an de aŭgusto. La protokolo sennŝanĝe aprobiĝis.

2. Ekonomio

Claude mallonge informis. Estas nur la kutimaj en- kaj elspezoj. Lars atentigis, ke ne estas repagita interkonsentita sumo al la klubo en Stavanger. Claude kontrolos kaj eventuale faros la transpagon.

3. Jarraporto 2019

La estraro trairis la malneton kaj aldonis mankantajn erojn. Ĉefe nun mankas informoj pri agado de NJE kaj la fina resumo. Mario kontaktos NJE por havigi agadraporteton, Bård verkos malnetan konkludon. Ni celas aperigi la raporton aŭ en NE-isto nr. 4 au nr. 5 2020.

4. Reta seminario 2020

Ĝi okazos sabate, au la 7-an aŭ la 21-an de novembro. Ni diskutis la enhavon. Konkludo: Ni invitos reprezentantojn de la dana kaj sveda landaj asocioj por informiĝi pri ilia agado kaj diskuti kunan agadon. Ankaŭ ni invitos Stefan MacGill, gvidanto de la Europa komisiono de UEA, kaj multjara kaj multflanka aktivulo. Mario kontaktos ilin.

5. Nepagintaj membroj

Ni diskutis kiel kontakti la forfalantajn/-intajn (eks-)membrojn. Konkludo: Bård verkos mallongan, humuran leteron, kiun ni dissendos surpapere al tiuj kiuj pagis en 2018 au 2019. Antaŭe esploros Claude, ĉu eblas havigi Vipps kaj/au e-fakturon/autoĝiron por ke ni faciligu la pagadon.

6. Nova servilo por nia retejo

Judith transigis la enhavon de nia retejo al nova servilo pro teĥnikaj postuloj. Estis elspezo iom pli ol mil-krona. La retejo nun funkcias kiel antaue.

7. Broŝuro «Oppdag Esperanto»

Ni aĉetis la rest-stokon, 85 ekzemplerojn de la verkinto Stano Marchek. Bedaŭrinde ni devis pagi altan doganon, do fine la kosto iĝis por ĉiu broŝuro po 20 kronojn.

Ekestis diskuto, ĉu aktualas reeldoni ĝin au alian broŝuron, ekz. traduki «PakEjo», kiu inter alie troviĝas en la dana. Ankaŭ estas demando, ĉu ni entute bezonas paperan broŝuron. Decido: Ni metu la diskuton pri broŝuro sur la tagordo de nia sekva interkonsiliĝo.

8. Eventualaĵoj

a) Vortara laboro

Bård opiniis, ke necesas diskuti la laboron pri nova vortaro. Decido: Jardar kaj Herman prezentos la staton de la laboro en la venonta interkonsiliĝo.

b) Operasjion Dagsverk

Claude proponis, ke ni dungu gejunulojn por fari iun utilan informagadon dum la unutaga Operasjion Dagsverk. Decido: La estraro instigas al la klubo en Tromsø fari «piloton» kaj testi, ĉu eblas utiligi Operasjion Dagsverk tiumaniere.

c) Vizitoj al Esperantonia

Bård mallonge raportis de siaj du someraj vizitoj al la oficejo. I.a. paneis la aersekiĝilo en la stokejo. Bård kontaktos Douglas, por sciiĝi, ĉu nova sekigilo estas instalita.

ĉ) Virtuala Kongreso

Kvar estraranoj kaj tri aliaj membroj aliĝis al la Virtuala Kongreso de UEA, kiu pro la korona viruso anstatauis UK-on. Parto de la kongresa enhavo estas daŭre alirebla.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:30

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 24-an de septembro je 20:30

Protokolis Bård Hekland